

esperanto gazeto

DE INTERNACIA INSTITUTO POR OFICIALIGO DE ESPERANTO



47

FEBRUARO
1971



EL LETEROJ AL LA REDAKCIO

GUSTIGO

En E-Gazeto, nr. 43-44 sur la paĝo 15, sub la titolo BERNARD GOLDEN oni komprenigas, ke d-ro L. L. Zamenhof kiel kuracisto praktikis en Bjalistoko. Tio tamen ne estas vera: Zamenhof praktikis en: Vejseje, Varsovio, Herson, Varsovio, Grodno, Varsovio. Do io neklara (klarigenda) pri familiaj tradicioj de s-ro Bernard Golden.

Tadeusz Nowakowski, Pollando

Resp. de la Red.: Dankon pro la atentigo, verŝajne en la menciita artikolo superfluas la vorto »pacientino«.

60.000 DOLAROJN, POR KIU PLANO?

En la numero 43-44 de E. G. mi legis en Resp. de la Red. la jenan proponon: »... se la 2.000 kongresanoj nur unu jaron rezignus pri tiu amasrenkontigo (temas pri U. K.-j), ilia kongreskotizo, kiu ampleksas ĉirkaŭ 60.000 dolarojn povus esti utiligata por realigi gravajn planojn por la enkondukado de Esperanto en la praktikan vivon.«

Antaŭ al mi skribos plu, mi klarigos ke la 60.000 dolaroj ne inkluzivas la kostojn de loĝado kaj vojaĝado de la kongresanoj; se ni tion

NIA KOVRILPAGO

La kompleta preparokomitato de la XX. Olimpikoj en Munkeno en 1972 sendis al niaj legantoj tiun ĉi novjar-saluton en germana, angla, hispana, portugala, rusa, japana, itala kaj franca lingvoj. Ĉu iu el ili scias ankaŭ la internacian lingvon Esperanto? Ankoraŭ ne estas malfrue lerni ĝin ĝis la Olimpikoj. Ĉu la munkenaj amikoj atentigos ilin?

enkalkulus la sumo estus pli ol trioble la menciita. Tamen ni devas trakti la psikologian valoron de la kongresoj, se ne la aliajn. Lokaj grupoj klopodas aligi homojn al la movado kaj tiuj novuloj volas renkonti kun Esperantistoj de aliaj landoj; ni devas memori ke celo de Esperanto estas faciligi interkontakton de la diversaj popoloj.

La Universalaj Kongresoj estas la praktika pruvo de la asertoj de nia propagando. La partoprenantoj de kongresoj estas, plejparte, fervoraj Esperantistoj kaj la plimulto malavare subtenas la movadon. Se ili ne havus la okazon partopreni aŭ grandan Kongreson, aŭ malgrandan Esperantan Semajnon, ili perdus la fonton de instigo al laboro por Esperanto, al abono de revuoj, aĉetado de libroj kaj rekta financa subteno de la diversaj asocioj kaj institutoj Esperantistaj.

La alia flanko estas la logika kaj negoca, kiu respondas al la demando: kiuj estas tiuj gravaj planoj?, ĉar se mi devas donaci la sumon de 109 dolaroj, kiu estis miaj elspezoj por la Kongreso de Vieno, mi volus scii la planojn por kiuj mi donacis pli ol duonon de mia monata salajro; kaj ĝis nun mi ne vidis en iu ajn revuo, kalendaraj, koncizajn, realigeblajn planojn por »la enkondukado de Esperanto en la praktikan vivon.«

La esperantistoj donacas jam malavare, ili abonas revuojn kaj aĉetas librojn en relative pli granda kvanto ol tiuj eldonitaj en naciaj lingvoj. Mi ofte miras pri la malavareco de multaj Esperantistoj kiuj subtenas projektojn kaj planojn kies semoj estas evidente sterilaj kiam oni kalmem rigardas ilin anstataŭ entuziasme kaj emocie. Ni bezonas planojn por »la enkondukado de Esperanto en la praktikan vivon.« sed tiuj planoj devas esti detale pensitaj kaj

ankaŭ relativaj al niaj fortoj. Of niaj planoj fiaskas ĉar la celoj estas tre grandaj por ni, kaj tio ne estas la kulpo de la donacantoj. Ne pet al ni ke ni oferu niajn kongresoj por iuj nedifinitaj planoj!

A. Díaz., Britujo

Resp. de la Red.: La redaktoro tute ne estas kontraŭ kongresoj, li aldis pri ili nur ĉar ili okazas ĉiujar kaj tre multe kostas, servante ĉe por interamikigo kaj amuzigo (esperantistoj, kiel vi mem konfesa kompreneble, tio estas tre grav sed estas ankaŭ aliaj celoj, en nuna epoko eble decidaj, por kiute mankas mono. La ideo, do, ĉe ti trovi rimedojn ankaŭ por ti celoj, kaj la redaktoro nur prete menciis kiel unu el la eblecoj, valorus oferi unusolan kongreson por atingi ion pli gravan — ne ĉe kongresoj ne estas necesaj, sed ĉe mono estas necesa.

Vi volus vidi klarajn, koncizajn realigeblajn planojn por la enkondukado de Esperanto en la praktikan vivon — por eventuale ofi ion da mono por ili. Se vi regule legas Esperanto-Gazeton (antaŭ IOE-Gazeto), vi povas trovi en tute ĝeneralan programon (Statu en n-ro 4/1966), ĝeneralajn planojn de diversaj agadkampoj, kaj tu konkretajn detalajn planojn de ur opaj kampanoj, aliflanke vi pov trovi ankaŭ informojn pri jam atingitaj sukcesoj. Ĉiu plano kiu ĉe cernas enkondukon de Esperanto en la praktikan vivon, estas REAL GEBLA, — ĉar se ne, ne valor batali por Esperanto! Temas nur pri tio, kiom daŭros nia laboro, kaj forte dependas ankaŭ — sed ne de la disponeblaj financaj rimoj. Tiel detalajn kaj precizajn planojn kiajn vi imagas, kun firmita financa antaŭkalkulo, oni ne pov

fari se oni ne havas la necesan monon kaj oficistojn, sed kiam la mono kolektiĝas, oni kompreneble farus ilin. Ankaŭ tiam la rezultoj ne estas precize antaŭvideblaj, ĉar ili ne dependas nur de ni esperantistoj. Memoru la planon de multimilionas subskribkolektado por Unuigintaj Nacioj — kaj plurajn aliajn! Granda, bone organizita kaj finance subtenata plano ne ĉiam signifas certan sukceson, aliflanke ofte kun malpli da homoj, energio kaj mono, eĉ sen ĝi, oni atingas konkretajn sukcesojn por la movado. Se oni havas grandajn planojn kaj malmulte da mono, oni efektivas nur partojn de la antaŭviditaj planoj. Kaj se ekzemple IOE foje ricevas hazarde tiujn 60.000 dolarojn (aŭ ĝian trioblon laŭ via kalkulo), ĝi certe ne jetus la tutan sumon por komplete efektivi unu kampanjon, sed farus la komencajn laborojn en pluraj direktoj — ĉar nek estas eble dum mallonga tempo enkonduki E-n en unu fakon, nek tiu laboro havus grandan valoron se ĝi restus izolita, sen paralela kampanjo en multaj aliaj sferoj.

MUZEJOJ

Mi aliĝas al kunlaboro en la fako »muzeoj«. Tiurilate bonvolu okaze doni al mi instrukciojn kaj konsilojn, kion mi devus fari.

Libor Krivanek
Ĉeĥoslovakio

Resp. de la Red.: En la januara numero, kiu estis en la presejo kiam vi skribis, aperis instrukcioj. Bonvolu utiligi ilin.

POEMO PRI ABALIGET

Je signo de bona memoro pri la tagoj de la 3-a IREN en Abaliget, mi havas la honoron proponi por via gazeto mian ĵus verkitan rakonton pri tiuj 10 tagoj. Kvankam ne absolute perfekta kaj korekta, kiel amatora originala verkaĵo, ĝi donas vivon de nia amata lingvo praktikante ĝin en verkado. Mi esperas ke via prijugo estos favora kaj konsideros mian ambicion kaj lacigan streĉon de la fortoj dum la maljuna aĝo.

Boris Kavalĝiev
Bulgarujo

Resp. de la Red.: Ankaŭ ni sentas nin honorigitaj per la sendaĵo. Tamen, versaĵoj ne apartenas al nia interesa sfero. Krome al IREN ni jam dediĉis sufiĉe da spaco. Laŭ nia opinio estus pli bone sendi la materialon al Bulgara Esperantisto aŭ Hungara Esperantisto, post iometa korektado de kelkaj versaĵoj malglataj. Koncerne vian aĝon mi povas diri nur, ke mi envias vin.

Ni petas atenti nian novan adreson:

EL LA MOVADO

VINTRE EN BIELLA

Biella Esperantista Rondo organizas la 27an kaj 28an de februaro 1971 ĉe Lago Mucrone (Oropa), fama skistacio (1.900 m. super la marnivelo), nur kelkajn kilometrojn de Biella INTERNACIAN ESPERANTISTAN RENKONTIGON SUR LA NEGO kaj 2an INTERNACIAN ESPERANTISTAN SKIKONKURON. Partoprenkotizo (por ambaŭ tagoj): — Dulita ĉambro kompleta pensio kun banĉambro 10.000 liroj, sen banĉambro 8.000 liroj. Antaŭmendoj ĉe »B. E. Ro. — c/o Vassallo Pier Giorgio — via Repubblica 63 — 13051 Biella« Al ĉiu antaŭmendo estu aldonataj 5.000 liroj. Ĉiu antaŭmendo devas indiki nomon, antaŭnomon, sekson, loĝlokon, naciecon kaj deklaron pri intenco partopreni la skikonkuron kaj kategorion.

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ LIEĜO (BELGUJO), 30. 7. — 27. 8. 1972

Post eliro de nia unua cirkulero en januaro 1970, okazis multaj prelaboroj por organizi somerajn universitatajn kursojn. Certe tre gravaj eroj de tiuj preparoj estis la prelego de d-ro Neergaard pri »Universitato kun Esperanto kiel instruilingvo« kadre de ISU en Vieno kaj same en la urbo de la 55-a UK du kunsidoj de universitatanoj speciale invitataj. D-ro Neergaard rekomendis iri la de ni skizitan vojon kaj la partoprenintoj de la dua kunsido subskribis dokumenton, per kiu ili komisiis nin daŭrigi kaj konkretigi la preparojn por la unua sesio de SUK dum 1972.

Konforme al la menciita dokumento, ni pligrandigis nian komitaton per aldono de s-ro André Heek, asistanto en la astrofizika instituto de la universitato de Lieĝo.

Dum nia kunsido de la 19-a de decembro 1970 ni decidis okazigi la unuan sesion de SUK de la 30-a de julio ĝis la 27-a de aŭgusto 1972 en la universitato de Lieĝo. La rektoro de tiu universitato disponigis al ni modernegajn lekciejojn kaj studentajn loĝejojn en la tute nova universitata kvartalo Le Sart-Tilman apud Lieĝo. — Aliaj bazaj sciindaĵoj:

La celo estas apliki la Internacian Lingvon en universitata instruado.

La programo ampleksos lekciojn kaj praktikajn studojn en du sekcioj:

- 1) LINGVISTIKO,
- 2) MEDICINAJ SCIENCOJ.

La kondiĉoj de partopreno:

- 1) abiturienteco aŭ similnivela klereco;
- 2) minimuma aĝo: 17 jaroj, maksimuma aĝo 40 jaroj.

SUK-komitato decidis pri esceptoj.

La sola lingvo de SUK estos la internacia lingvo Esperanto.

Ĉiu partoprenonto pagos proksimume 400—500 guldenojn, kiuj kovros ĉiujn kostojn de tranoktado (en unulitaj ĉambroj), 3 potagaj manĝoj kaj programo dum 4 semajnoj. (Ĉesto dum malpli ol 4 semajnoj kaŭzos rabaton de kostoj.) La definitivaj kotizoj dependos de la evoluo de la vivokostoj en Belgujo.

Korespondadreso: Wim Jansen, Röntgenstraat 32 a, VLAARDINGEN 3170, Nederlando.

ESPERANTISTOJ EL PECS (PEĈ, HUNGARUJO) KLOPODAS DISSIRI LA »VERDAN KURTENON«.

En la esperantistaj organizaĵoj oni kutimas familie festi la naskiĝtagon de d-ro ZAMENHOF. Anstataŭ tio, la esperantistoj de Pécs aranĝis packunvenon kune kun la loka Patriota Popolfronto. Per tio ili akiris, ke multe da neesperantistoj partoprenis la solenan kunvenon kaj konatiĝis kun la ideo de la Internacia Lingvo.

D-ro József Takács (Jojef Takaĉ), sekretario de la Popolfronto, hungarlingve konigis la vivon de Zamenhof, kaj la rolon de Esperanto en la nuna kaj en la sekvonta epoko.

La kulturalan programon oni aranĝis parte Esperante, parte nacilingve. La loka ĵurnalo sur la unua paĝo raportis pri la solenaĵo.

Komence de januaro 1971 okazis en Pécs ekspozicio de esperantistaj poŝtmarkoj, glumarkoj kaj kovertoj, stampitaj en diversaj E-kunvenoj, kongresoj, renkontigoj. La ekspozicion kaj la malferman letervesperon kune aranĝis la filateliera rondo de la asekuristoj kaj la E-Grupo »Doktor Sándor«.

La tria E-Balo en Pécs okazis la 30-an de januaro.

Okaze de la Semajno de la Internacia Amikeco la esperantistoj de Pécs planas aranĝi vesperon kun la tie lernantaj eksterlandaj — ĉefe afrikaj — studentoj.

La dektagan 4an IREN (Internacia Renkontigo Naturamika, 17—27 jul. 71) partoprenos ankaŭ neesperantistaj hungaraj kampadistoj, kiuj ankaŭ en Abaliget aranĝos sian landan renkontigon. Ili helpe de interpretistoj interkonatiĝos kun la eksterlandaj esperantistaj naturamikoj.

ESPERANTO-GAZETO

ORGANO DE INTERNACIA INSTITUTO POR OFICIALIGO DE ESPERANTO

FEBRUARO ★ N-ro 47 (Jaro VI/2)

Cefredaktoro: T. Sekelj, 11.000 Beograd, Pop Lukina 1.

Aperas 10 foje jare.

Bankkonto: Beogradska udružena banka, 608-620-1-1-32000-10-458 I.O.E. Beograd, Jugoslavio Por Jugoslavio: 608-8-1353-10

ESPERANTO-GAZETO. Izdaje: Međunarodni institut za ozvaničenje esperanta, Lole Ribara 14, 11000 Beograd.

Odgovorni urednik: Antonije Sekelj, 11.000 Beograd, Kondina 24.

Stampa: Stamparija »Sava Mihić« Zemun, Maršala Tita 46-48.



La direktoro de IOE kaj ĉefdaktoro de Esperanto-Gazeto Aŭstralio diskutas kun simpam kanguruo pri la enkonduko de Esperanto en la praktikan uzon. Ĉi tiu foto li kore salutas ĉiujn gantojn.

11000 BEOGRAD, Lole Ribara 14

ESPERANTO EN SOCIAJN ORGANIZAJOJN: MONDVASTA KAMPANJO

La kampanjo komenciĝis. Ĉie en la mondo nun eklaboras la kunlaborantoj de IOE por enkonduki esperanton en la sociajn organizaĵojn.

Cu ankaŭ vi jam partoprenas?

Ju pli da esperantistoj helpas, des pli efike progresos la kampanjo. Multaj sociaj organizaĵoj jam frontas gravajn lingvajn problemojn; aliaj en ne fora estonto staros antaŭ la sama demando. Ni povas doni al ili la rimedon kiu superas la lingvajn murojn. Ni donu ĝin al ili! Ankaŭ vi ne staru nun flanke en la decida batalo por la interkompreniĝo de la homaro!

Kiel vi povas helpi?

Versajne vi ne estas ano de iu socia organizaĵo neesperantista, kaj demandas vin: ĉu mi tamen povas fari ion en tiu kampanjo? **Jes, vi povas!** En ĉiu urbo, ĉe en preskaŭ ĉiu vilaĝo, certe do ankaŭ en via komunumo, troviĝas iaj sociaj organizaĵoj, kluboj, societoj, grupiĝoj de homoj kun samaj intereso. Vizitu ilin, aŭ almenaŭ iliajn respondeculojn. Parolu al ili pri la senĉese kreskanta lingva problemo en la mondo. Menciuj, ke nuntempe ĉie en la mondo niaj kunlaborantoj kontaktas kun samcelaj sociaj organizaĵoj kaj prezentu al ili la internacian lingvon, kiu forigos la lingvajn barojn. Proponu al ili prelegojn kaj kursojn pri la internacia lingvo. Proponu al ili kontakton kun eksterlandaj samcelanoj pere de Esperanto. Kaj ne forgesu: Informu ankaŭ la gvidanton de la kampanjo pri viaj klopodoj kaj ties rezultoj. Adreson vidu malsupre.

Eble vi eĉ estas ano de unu aŭ eĉ de pluraj sociaj organizaĵoj. Des pli bone! Tiam vi povas — krom la supre menciita agado — jam organizi la laboron en via organizaĵo socia. Rekonsultu la programon de

la kampanjo, kiun vi trovas en »Esperanto-Gazeto« n-ro 43-44, paĝoj 6-7. — Ne forgesu vin anonci ankaŭ ĉe la gvidanto de la kampanjo. Lian adreson vidu malsupre.

Esperanto ĉe Ruĝkruco

La unuaj paŝoj por tiu kampanjo jam estas faritaj. Tiu mondkonata helporganizaĵo, fondita 1863 de Henri Dunant, povus helpi eĉ pli multe al la homoj, se forestus la lingvaj malhelpoj. Estas konate, ke precipe lingvaj malfacilaĵoj jam sufiĉe ofte prokrastis urgajn helpkampanjojn de la Ruĝkruco! Leganto de ĉi tiu alvoko, ne hezitu ankaŭ viziti viajn lokajn respondeculojn de Ruĝkruco kaj atentigu ilin afable pri la utilo de Esperanto por la noblaj taskoj de Ruĝkruco! — Postskribo: La gvidanto de la kampanjoj en sociaj organizaĵoj ĝojos, se vi koncize informos lin pri la rezulto de viaj klopodoj ĉe Ruĝkruco. Lia adreso: Manfredo Führer, Poŝtfako 162. **D-3340 Wolfenbüttel, Germanio**

INTERESAJ NOVAĴOJ

INTERESA INFORMO PETITA DE ITALA GAZETO ESTIS AKIRITA PER ESPERANTO. — En la 52-a numero de 1970 de la itala semajna gazeto »Radiocorriere«, en la rubriko »Malfermitaj Leteroj al la Direktoro« aperis jena informo. »Antaŭ pli ol tri monatoj la leganto Bruno Turri el Spresiano, informante, ke unu el liaj filoj adoptis korean knabineton, demandis, ĉu mi konas la italan signifon de la nomo de la infano »Kim Oh Bok«. Car mia kulturo ne atingas tion, mi turnis la demandon al bonvolemaj legantoj de »Radiocorriere«. Unu el ili, s-ro Fernando Zaccà el Mantova — kiun mi varme dankas — skribis al mi: »Mi

pensis povi ricevi tiurilate rektajn informojn el Koreujo. Konante la lingvon Esperanto, plej internacian, mi prenis la Jarlibron de UEA kaj mi elektis nomon kaj adreson de esperantisto en Koreujo, universitata profesoro Semanto Taekeng Kim, el Seul, kiu afable respondis miajn demandojn ĉiam en Esperanto, ĉar nek mi konas unu ĉinan vorton nek li unu italan. Jen, resume, la ricevita respondo: 'Antaŭ ĉio prof. Taekeng Kim varme dankas la familion, kiu adoptis la etan korean orfinon, pro la humana ago, kaj deziras sanon kaj prosperon por la estonteco. Poste li klarigas: Kimhai (kiun oni elparolas Gimhe) estas urbeto proksime de la urbo Pausan, fondita antaŭ 4000 jaroj de la reĝa familio Kim, kiu regadis dum 2000 jaroj en la suda parto de Koreujo. Kim estas nuntempe ĉina familia nomo, la plej multnombra en Koreujo, tiel ke preskaŭ la duono de la korea popolo havas ĝin (inkluzive de la orfino kaj de mi mem). La signifo de Oh Bok estas: kvin feliĉoj. Laŭ korea tradicio la persono plej feliĉa kaj potenca estas tiu, por kiu validas la jenaj kondiĉoj: 1-a) gepatroj pli ol 70-jaroj, vivantaj; 2-a) multaj gefiloj; 3-a) dentoj blankaj kaj sanaj; 4-a) bona kaj amema edzino; 5-a) bona reputacio.'

Ĉi tiu letero sendube ĝojigos tiujn legantojn, kiuj skribis por proponi Esperanto-kursojn ĉe la radio kaj televido. En ĉi tiu okazo Esperanto montrigis efektive utila.



En Subotica (Jugoslavio) okazis internacia esperantista geedziĝo. Fino Magdalena Konja, studentino el Subotica kaj s-ro Alberto C. Stagi juristo el Massa, Italujo geedziĝis en oktobro 1970. Ni plej kore gratulas al la nova geedza paro.



LA FESTADO DE LUCIA ESTAS MALNOVA IDOLANA KUTIMO

La 13-an de decembro miloj da svedaj hejmoj festas Lucia. Tiu sicilia sanktulino vivis laŭ la legendo antaŭ 1600 jaroj. Sed ĉu vi scias, ke la modeloj por la festado estas pure idolana tradicio, kiu estas nur adaptita al kristanaj cirkonstancoj?

Antaŭ ol la kristaneco serioze penetris en nia lando, oni festis la tiamaĵn diojn per grandiozaj festoj. Interalie estis aranĝita reala mezvintra buĉ-oferado, kiam ĉiuj drinkis kaj manĝegadis tutan semajnon.

Sed kelkajn semajnojn antaŭ tio oni kaptis la okazon provgustumi la manĝaĵojn. Buĉado, bakado kaj bierfarado tiam estus preta kaj tio estis festata per speciala ofer-soleo honore al la diino de fekundeco Freja. Tiu festo estis aranĝita en la komenco de decembro — en la sama tempo en kiu ni nun aranĝas nian »lussefeston«.

La plej juna fraŭlino el la domo tiam regalis ĉiujn domanojn per porkaĵo, fromaĝo kaj biero. Krome ŝi bakis grandan panbultkon el la plej lastaj greneroj de la tiujara rikolto, glitigis ĝin super la mamoj de bovinoj kaj la dorsoj de la porkoj; poste ŝi transdonis la panon al la dommastro, kiu solene oferis ĝin al la diino de fekundeco Freja.

Tion oni faris por ke la diino zorgu ke greno, lakto kaj lardo ne manku en la bieno dum la venonta jaro kaj por ke la rikolto de la sekvanta jaro ne estu detruita.

Poste kiam la kristaneco estis enkondukita, proksimume en la ja-

ro 1000, ne estis eble simple nuligi tiun solenon. Anstataŭe, kiel kompense, oni festis la sanktulinon Lucia.

La plej multaj certe aŭdis la legendon pri la sicilia sanktulino Lucia, kiu vivis proksimume en la jaro 300.

Tiu juna virgulino, laŭ la legendo, elpikis siajn belajn okulojn nur pro tio ĉar idolana junulo enamiĝis je ili. Por konverti lin ŝi transdonis al li la okulojn sur plado, kaj tiel sukcesis lin konverti. Laŭ la legendo Dio poste donis al ŝi eĉ pli mirindajn okulojn.

Iu pli malnova legendo klarigas kial Lucia portu kandelojn en sia hararo. Ŝi, nome, perdis sian vivon kiel martiro en Sirakuzo. Unue oni provis ekzekuti ŝin sur bruleŝafodo. Sed la fajro ne volis ŝin vundi, ĉar ŝi estis ĝia aliancano. La flamoj dividigis rifuzante difekti ŝin. Pro tio oni estis devigataj ekzekuti ŝin per glavo.

El la idolana tradicio la rolon de juna virino transprenis Lucia, sed ŝi devis esti blanke vestita kaj porti brulantajn kandelojn sur sia kapo. Krome, dum la tuta tago neniu rajtis nomi ŝin aliel ol »Lussi« aŭ »Lussibrud« (Lussi-novedzino), alimaniere ŝi neniam edziniĝus.

La biero, fromaĝo kaj lardo estis poste anstataŭigitaj per brultrinkaĵo, kafo kaj spickukoj. Sed la panbultkon kiu estis oferata al Freja, ankoraŭ restis en preskaŭ origina formo. Ĝi nomiĝas »kato de Lussex« aŭ Lussebulko.

La fakto ke Lucia estas festata ĝuste la 13-an de decembro, devenas de malnova mezepoka miskompreno. Oni tiam kredis ke la nokto antaŭ la Lucia-tago estis la plej longa nokto de la jaro. Tial Lucia, kiu nomiĝas ankaŭ »la reĝino de la lumo«, simboligus tiun ŝanĝon al pli longaj tagoj kaj malpli longaj noktoj.

Tiun koncepton oni tute forĵetis, kiam la gregoriana kronologio estis enkondukita meze de la 18-a jarcento. Sed la luciutradicio obstine restis vivanta.

Frumatene la 13-an de decembro centoj da svedaj hejmoj estas honorvizitataj de juna knabino en »lusse«-vestaĵo. Sed tio ne sufiĉas. Krom tio preskaŭ ĉiu hejmo, preskaŭ ĉiu urbo, vilaĝejo, lernejo, societo kaj gazeto, elektas sian propran Lucia. Tiu pli-malpli komerca maniero per »jippo«-akcentitaj voĉdonadoj elektis Lucia, estas tre novdata kutimo.

La stokholma gazeto »Stockholms-Tidningen« enkondukis tiujn novajn tradicioformojn kun forte publika karaktero. La gazeto estis la unua kiu sian legantaron voĉdo-

nigis por elekti inter kelkaj junaj knabinoj. Tio okazis la unuan fojon en Stokholmo en 1927. Tiu knabino estis poste ĉirkaŭkondukita en triumfa marŝo tra la stratoj de Stokholmo kaj supersutita per donacoj de ĉiusecaj firmaoj. El tio poste kreskis la nunaj tradicioj.

»MIELA LUNO EN RIMINI 1971« konkurso por junaj geedzoj

1) La turisma Entrepreno kaj la Asocio de Hoteletoj organizas konkurson »miela luno« en Rimini, kiun rajtos partopreni ĉiuj junaj geedzoj, kiuj ne atingis la 35-an jaron je la 20-a de majo 1971-a, bone parolas Esperanton kaj ne gajnis en la pasintaj eldonoj de la konkurso.


2) La premioj konsistas el 14-taga senpagaj restadoj en unu-klasaj hotejoj de la marbordo de Rimini (Italujo). La restadperiodo estas fiksita de la 26-a de majo ĝis la 8-a de junio 1971. Dum la restado oni aranĝos apartajn festojn, ekskursojn kaj regalojn honore al la paro.

3) La konkursantoj, plej malfrue ĝis la unua tagdeko de la venonta aprilo, devos sin anonci per letero aldonante la plej belan foton de la edzino kun edziniĝa vesto aŭ foton de la paro kaj la daton de la geedziĝo.

4) Tiucela komisiono plenrajte selektos, juĝos kaj premios la parojn.

5) Oni adresu ĉion al la delegito de U.E.A. en Rimini:

Albino Ciccanti —
S. Bernardino, 26
47037 RIMINI (Italujo)



Tiel la movado jen stagnas, jen malprogresas. Mi havas la savideon kiu subite ŝanĝos la grafikon: **PLIALTIGO DE LA KOTIZO!**

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA
ESPERANTO-ORGANO

Aperas jam 50 jarojn. Ĉiujare 18 numeroj — efektive 2 numeroj monate. Ĉi-jare, krome, literatura kaj scienca suplementoj.

Malgraŭ ĉio la abonprezo estas nur 4,50 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro. Anonco ĝis 25 vortoj US \$ 1,— (7 resp-kup).

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj, aŭ ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, B-1000 BRUXELLES 1.

Postkontoj belga: 78887, germana: Köln 194943.



KIEL EKISTIS LA EŬROPAJ URBAJ BLAZONOJ

La unuaj urbaj blazonoj aperas en la 12-a jarcento. Antaŭ tio la eŭropaj urboj, por marki monerojn kaj sigelojn, uzadis diversajn ŝanĝeblajn simbolojn, per kiuj oni ornamis ankaŭ monumentojn kaj urbodomojn. La akceptado de blazonoj fare de eŭropaj urboj estas stranga, ĉar la blazono ekstis por ke kavaliroj portu ilin sur siaj ŝildoj, kaj urbo, komprenabe, ne portas kirason.

Kiel rekonu kavalirojn?

Dum la krucaj militoj, kiujn en la 11-a kaj 12-a jarcentoj entreprenadis eŭropaj feŭdestroj por konkero de mezoriento, aperis nepre bezono uzi ujn disting-signojn por rekonu la soldatojn. La partoprenantoj de tiuj invadoj, la krucistoj, kiel siajn signojn portadis sur la ŝildoj kaj kaskoj grandajn krucojn.

Sed ĉar la invadojn partoprenadis multaj eŭropaj monarkoj kaj gravaj feŭdestroj, ĉiu kun sia militistaro, la kruco sola ne estis sufiĉa signo de unuopaj taĉmentoj, des pli ĉar ne estis uniformoj, sed oni portis plej ofte kirason, kaj tiel ĉiuj militistoj estis simile vestitaj.

La aperon de blazonŝildoj plirapidigis ankaŭ la kavaliraj turniroj, la plej ŝatata amuzo de tiutempaj feŭdestroj. Dum ili okazadis divesaj konkuroj, individuaj kaj grupaj bataloj. La partoprenantoj armitaj per lancoj kaj ŝildoj, portis pezajn kirasojn kun fermitaj kaskoj, tiel ke la vizaĝoj ne estis videblaj. Rekonado de unuopaj partoprenantoj estis preskaŭ nebla.

Pro tio, unue sen iu ajn ordo, poste laŭ preciza plano, estis enkondukitaj sistemo por markado de ŝildoj per koloroj. Por tio estis kompetentaj precipe korteganoj kiuj servis kiel oficialaj heroldoj ĉe kortegoj de suverenoj, kaj oni nomis ilin »heraldoj«.

La ŝildoj estis kolorigitaj en la formo de geometriaj figuroj, kaj poste ornamitaj ankaŭ per figuroj de diversaj rabobestoj, mitologiaj personoj kaj birdoj. La plej konataj kavaliroj de mezepoko gardadis de turniro al turniro la samajn bildojn sur la ŝildoj, ĉar la publiko ilin nur laŭ ili rekonadis kaj memoris.



Berno. La ĉefurbon de Svisujo fondis duko de Ceringen post iu ĉaso kaj nomis ĝin per la nomo de unua besto kiun li ĉasis. Berno signifas Ursourbo.

Kiom da homoj — tiom da blazonoj

La mezepoko ĝenerale inklinitis al simboloj kaj koloroj, pro tio la blazonoj tiel subite disvastiĝis ke baldaŭ ne estis kavaliro, komercisto aŭ kamparano, kiu ne elstarigadis fiere iun pentraĵon kiel sian blazonon. Komprenabe, la urbaj administracioj kaj gildoj ne forestis tiurilate. Des pli, se la urbo havis la staton de libera urbo, respektive se ĝi estis sen rekta feŭdestro.

Por enkonduki ordon en tiun kaŝon, la aferon prenis en siajn manojn »heraldoj« asociiĝintaj en »heraldikaj kolegioj«. Nuntempe en Eŭropo ekzistas nur 4 oficialaj heraldikaj kolektivoj: angla (kaj brita), skota, ulstera kaj Grandkonsilantaro de Nobeloj en Nederlando.

Laŭ la »Heraldoj« ankaŭ la scienco pri blazonoj akiris la nomon »heraldiko«. Kun la tempo la heraldoj faris kompletan revizion de blazonoj kaj starigis striktajn regulojn pri atribuo de novaj kaj rekonado de malnovaj blazonoj. La blazono fariĝis privilegio de la nobelaro, hereda kaj neŝanĝebla, escepte kun permeso de monarko kaj heraldo.

Komence la urbo kaj feŭdestroj mem decidadis kion elekti por blazono. Sed baldaŭ aperis problemoj ĉar okazadis ke du urboj alprenis la saman blazonon. Pro tio la interveno de la heraldoj venis en ĝusta momento, des pli ĉar blazono kiun monarko atribuis, estis ĉiam pli estimata ol la memelektita. Poste la atribuo de blazonoj fariĝis eks-

kluziva rajto de monarko kaj la plej altrangaj feŭdestroj.

Kiam iu vilaĝo fariĝis urbo, la monarko aŭ feŭdestro atribuis al ĝi blazonon. La nova urbestro persone akceptis la ĉarton kun la blazono, sur pergamento, konfirmitan per granda ŝtata sigelo, kaj la dokumenton pri komerca kaj foira rajto.

kaj blua, la norvegaj estas tre pitoreskaj kaj la finnaj estas konataj laŭ sia beleco.

La plej oftaj blazonmotivoj

La motivoj de urbaj blazonoj ŝanĝiĝis dum la historio depende de la influo de unuopaj ŝtatoj. Tiamaniere en Aŭstrio, Ĉeĥujo, Jugoslavio kaj norda Italujo — plej ofte renkontiĝas urbaj muregoj, turoj, fortikaĵoj kaj pordegoj. Svisujo konservis la simplecon de ori-



Bon. Estas fondita 1243. La nigra kruco en la supra parto estas la blazono de Kelna ĉefepiskopejo. La leono unue aperadis en ore aŭ arĝente kolorigita spaco kiu en 1732 ŝanĝiĝis al blua.

ginaj blazonoj de turniroj kaj talkampoj, dum la francajn urbajn blazonojn karakterizas la supra parto de la blazono portanta reĝajn liliojn aŭ abelojn de Napoleono.

Sur la Britaj Insuloj oftaj motivoj estas leonoj, lilioj aŭ »reĝaj beĝoj«. Ĉe la svedaj blazonoj superregas la naciaj koloroj — ora

toj el la historio de la urbo; 6. Figuroj kiuj memorigas pri la ĉefa okupo de la loĝantaro; 7. Naturaj individuecoj; 8. Simboloj de privilegioj, honoroj kaj distingoj; 9. Figuroj sen logikaj klarigoj; 10. Kompleto de la ĉefaj figuroj kiel signo de honoro.




Varsovio. De 1590 ĝis 1795 estis sidejo de polaj reĝoj. Gis XVII jarcento la urba blazono portas la figuron de flugilhava sireno kun leona vosto. La pli moderna aspekto de la blazono devenas de la XVIII jarcento.

Nur kvar koloroj

La neinformitaj ofte eraras opiniante ke ĉiu figuro sur blazono havas iun signifon. Eĉ oni povas diri ke la plimulto de blazonoj estas kompilita tute hazarde kun la sola deziro ke ili kiel eble plej bele aspektu.

Kaj fine, jen du »Oraj Reguloj« de heraldiko:




Budapeŝto. La urba blazono aperis 1873 per unuiĝo de du ŝildoj de Budapeŝto (la fortikaĵo sur la malsupra parto) kaj Peŝto (la forikaĵo supre) dividitaj per ondigita Danubo. La stelo estas novdata.

En Hispanujo estas oftaj la bordoj kun leonoj kaj turoj de malnovaj reĝlandoj Leon kaj Kastiljo. Sur portugalaĵ urbaj blazonoj ofte aperas la vizaĝo de Dipatrino kun la infano, dum ĉe la blazonoj de italaĵ urboj preskaŭ neniu komuna karakterizo estas rimarkeblaj.

En pluraj socialismaj landoj urbaj blazonoj ĝenerale ne estas uzataj (Sovetio, Rumanujo, Bulgarujo, Albanujo). En Ĉeĥoslovakio kaj Hungarujo ili estis iam nuligitaj, sed nun denove estas vaste uzataj. La urbaj blazonoj en Pollando distingiĝas per riĉeco de motivoj.

La blazonoj de jugoslaviaj urboj estas tre malnovaj (Dalmacio, Kranj, Ohrid, Kruŝevac ktp).

Laŭ la temoj la urbajn blazonojn ni povas dividi en 10 kategoriojn: 1. Diversaj konstruaĵoj — muregoj, urbodomoj preĝejoj; 2. Monarko aŭ urbestro — portreto aŭ tuta figuro; 3. Patrono aŭ loka sanktulo, urba festo; 4. Figuroj kiuj per vortludo memorigas pri la nomo de la urbo; 5. Figuroj kiuj memorigas al iuj gravaj even-



Granado. 1492 la urbon perforte re-prenis de la navaraj reĝoj Ferdinando la II-a Aragona kaj lia edzino Izabela de Kastiljo. De tie devenas iliaj figuroj sur la blazono.

1. En blazono povas esti nur kvar koloroj (ruĝa, blua, verda, nigra) kaj du metaloj (arĝento, oro). Poste enkondukiĝis ankaŭ tri specoj de peltoj (ermena, sciura, zibela).

2. Neniam oni metas koloron sur koloron aŭ metalon sur metalon (ekzemple: oron sur arĝenton oni ne rajtas meti — la sola escepto estas la blazono de Jerusalemo).

PRIMOŝTENO

vintre kaj somere



La entuziasmaj amantoj de maro kaj suno nomas Primoŝtenon »Ora medaliono de meza Adria« kaj

centoj de la ultravioletaj radioj, en ĉi tiu klimato kies vintra aertemperaturo estas 15 gradoj celsiaj.

La ĉefsezono jam alproksimiĝas kaj ĉiuj litoj en la hoteloj kaj privataj domoj estas jam sufiĉe frue rezervitaj, nun estas la lasta momento por certigi lokon por restado dum la somero kaj aŭtuno.

Dum la sezono la gastoj havas je dispono multajn interesajn ekskursojn al la ĉirkaŭaĵo, al la tre interesaj historiaj monumentoj kaj al naturbelaj elstaras la mondfamaj akvofaloj de rivero Krka. Vel- kaj motor-boatoj estas ĉiam je dispono por viziti la proksimajn insulojn kaj aliajn interesajn kaj agrablajn lokojn.

La iam tute malfacile alirebla vilajeto nun kuŝas ĉe la ĉefvojo, tiel-nomata Adria Magistralo, inter la havenurboj Sibenik kaj Split, al kiuj oni povas alveni — se ne per propra veturilo — per trajno, ŝipo aŭ aŭtobuso, kaj de tie aŭtobusoj estas sufiĉe oftaj. Vojaĝantoj kiuj vojaĝas per aŭtobuso laŭlonge de Adria Magistralo, povas ricevi en ĉiu aŭtobuso bileton ĝis Primoŝteno.

la majestan hotelon »Adriatik« — perlo de tiu medaliono.

Estas tute egale ĉu vi venis al Primoŝteno somere aŭ vintre, vi fartas bone... En Adriatik, en ĉiu domo de gastamaj marbordanoj, vi sentas vin kvazaŭ ĉe viaj plej proksimaj parencoj. Post dutaga restado en tiu loko, kies aero kaj maro estas per nenio malpurigitaj, la gasto sentas sin freŝa kvazaŭ renaskiĝinta.

Vintro estas aparte agrabla en Primoŝteno. La gastoj estas en ĉi tiu medio entuziasmiĝintaj per la eksterordinara servado de juna kaj instruita personaro, de gejunuloj kiuj laŭ sia afereco jam akiris la epiteton de ĝentileco, helpemo kaj ĉarmiga konduto kun la gastoj, vizitantoj de Primoŝteno.

Vintro estas agrabla ankaŭ pro tio, ĉar la primoŝtenaj hoteloj havas varman kaj malvarman akvon. Speciala atrakcio estas la ronda vintra baseno kovrita per kupolo el pleksi-vitro tra kiu penetras 72 pro-

Malfacile estas per vortoj esprimi ĉion agrablan en Primoŝteno, kio staras je dispono de la gastoj — komence de diversaj sportterenoj, varma marakvo kaj varma sunumejo, eksterordinara hejmlanda kaj fremda kuirarto, ĝis la agrabla ripozo de tie ĉiam bonvenaj gastoj.



ORA LISTO DE I. O. E. por januaro 1971

1. S-ino **Dorothy Henderson**, Kanado US \$ 1387,20
2. F-ino **Betty Salt**, Kanado " " 962,40
3. **H. Scheffer**, F. R. Germanujo " " 204,96
4. **Hans Werner Grossmann**, Svisujo " " 116,24
5. **M.**, Italujo " " 81,20
- 6-7. **Felix Epstein**, F. R. Germanujo kaj **Ernesto Sonnenfeld**, Urugvajo, po " " 75,—
8. **Arne Pedersen**, Danujo " " 70,70
9. **Gian Carlo Fighiera**, Belgujo " " 56,—
10. **Miloslawa Kolinska**, Pollando " " 50,71

Plej proksimaj kandidatoj: A. kaj T. Sekelj (po 41,70), A. N. (F. R. Germanujo 34,84), V. Kruusalu (34,08), Hans Bakker (filo) (30,63), ing. J. Dettwiller (25,12), Ludoviko Demesmaeker (23,—) Zaga Milosavljević (17,80), Koloman Novak (16,75), D. Dimov (15,—).

EŬROPA ESPERANTO-FEDERACIO

Dum libertempa vojaĝo al la lago Garda en norda Italujo antaŭ kelkaj semajnoj mi havis la okazon konatiĝi kun la Esperanta grupo en Verona. Min tiel impresis la aktiveco, kiu regis en la grupo, ke mi volonte volas informi pri tio la aliajn esperantistojn.

Tiu aktiveco dependas, kiel ŝajnis al mi, de kelkaj treege aktivaj gvidantoj, i.a. D-ro Giovanni Marchiori (vicprezidanto de la Itala Federacio kaj direktoro de IOE), lia edzino Dea Veronese kaj D-ro Giorgio Vandelli. Per diversaj manieroj, i.a. gazetaj artikoloj, kaj aranĝo de grupvojaĝoj, ili sukcesis informi kaj entuziasmigi multajn homojn por Esperanto.

Mi estis invitita al ilia kursvespero, kiu okazas ĉiuvendre, kaj estis prezentita al la partoprenantoj. En la kursoj partoprenis ĉ. 160—170 personoj en 6 diversaj rondoj, la plej multaj gejunuloj. 3 el la rondoj estis por komencantoj kun ĉ. 30 personoj en ĉiu.

Fakte mi havis bonŝancon ĉar ĝuste tiun vesperon oni organizis komunan aŭtobusvojaĝon al Florenco venontan dimanĉon. Pro tio ankaŭ mi povis partopreni. Anoncis sin pli ol 35 personoj. La intenco estis, en Florenco sur la stratoj, ĉie en la urbo, disdoni flugfoliojn, 5000 mi kredas, kun informoj pri la lingva situacio entute kaj Esperanto. Samtempe oni informis la gazetaron kaj anojn de la urba konsilantaro. Ili ankaŭ presigis specialan folion por sendi al membroj de la urbaj estraroj de aliaj urboj en Italujo.

Alian iniciaton mi volas mencii. En februaro 1970 naskiĝis en Verona EŬ.E.F. Signifas Eŭropa Esperanto Federacio. Ĝi havos ĉefe du taskojn. 1) Kunordigi la agadojn de la eŭropaj landaj asocioj por ke Esperanto fariĝu la ĉefa internacia lingvo en Eŭropo. 2) Kunlabori kun UEA por naskigi aliajn kontinentajn federaciojn en Azio, Afriko, Norda Ameriko, Suda Ameriko kaj Aŭstralio.

Personojn, kiuj interesiĝas pri la eŭropa lingva problemo kaj ĝia solvo, mi petas skribi al la prezidanto de la nove kreita federacio D-ro Giorgio Vandelli, Via N. Mazza 42, 371 00 VERONA, Italujo.

Märtha Andréasson

ANONCETOJ

★ 18-jara lernanto Alik Melnikov dez. kor. kĉl., kolektas pm, bildk, revuojn, Seĉenova 8, kv. 46, ROStOV-DON — 12, Sovetio.

★ Mi kaj miaj gelearnantoj volus korespondi kun E-istoj el Jugoslavio. Mi estas 36-jara instruistino, kolektas infanajn kaj junularajn bildojn por nia ekspozicio. Anja Vojnaroviĉ, Avdejevskaja-3, d. 9, kv. 37, Doneckaja obl., Sovetio.

AL LA DIREKCIANOJ, PERANTOJ, ALIAJ FUNKCIULOJ KAJ AKTIVULOJ

Ĉi-jare la Konferenco de la Direkcio, kun partopreno de perantoj, aliaj funkciuloj kaj aktivuloj kiuj konas la celojn kaj metodojn de IOE, kaj libervole partoprenos la Konferencon

OKAZOS EN DU PARTOJ

kaj ĉiu rajtas partopreni kiun parton li povas, sed ankaŭ ambaŭ partojn.

La unua parto okazos en GULA, (Gyula), Hungarujo, de la 21-a ĝis la 23-a de julio; la dua en BRUSELO, Belgujo, de la 27-a ĝis la 29-a de julio.

Pri la unua parto ni jam scias jenon: pensiono en dulita ĉambro en moderna hotelo kostas 120 forintojn tage. Estas dezirinde kiel eble plej frue rezervigi litojn. En la venonta numero aperos la adreso.

Ĉiuj kiuj deziras partopreni kiun ajn parton de la Konferenco, bonvolu sin anonci al la ĝenerala sekretario de IOE, Antonije Sekelj, Kondina 24, 11000 — Beograd, Jugoslavio kiel eble plej baldaŭ.

URGA ALVOKO

La urbo AVIGNON (Francujo) preparas ekspozicion de infanaj desegnaĵoj kun la temo:

»Infanoj de la tuta Mondo«

La ekspozicio estos malfermata en la komenco de julio kaj estos videbla dum julio kaj aŭgusto.


La plej bonaj kontribuoj estos konservitaj por krei konstantan muzeon pri infana arto.

Por demonstri la efikan rolon de Esperanto, mi invitas ĉiujn samideanojn de ĉiuj regionoj de la Mondo sendi la plej bonajn desegnaĵojn, kiuj elvokas vivon, zorgojn, ĝojojn, suferojn kaj feliĉojn, sopirojn de la infanoj de iliaj landoj.

Eble personoj, kiuj jam organizis similan ekspozicion povus pruntedoni al ni sian materialon


Mi antaŭdankas al ĉiuj kontribuantoj.

S-ino S. HUMM
Chemin des Neuf Peyres
84 — AVIGNON
Francujo



Parodnu, sinjoro, mi nur aplikas rektan metodon por klarigi la verbojn ADULTI kaj KOKRI.

★ Se iu deziras iom da tempo pasigi en Ĉeĥoslovakio kaj interŝange gastigi iun el tiu lando dum la sama tempo, bv. sin anonci al Jos. V. OTTA, Vančurova 34, ŠUMPERK.



RECENZOJ

PACO N-ro 4-5 1970 aperis en Sovetio kaj estas dediĉita al Vladimir Iliĉ Lenin, kun multaj historiaj detaloj kaj belaj ilustraĵoj. Sampakaje alvenis al ni ankaŭ broŝuro »Centa Datreveno de la Naskiĝo de Vladimir Iliĉ Lenin«, eldonita de Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj — Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj. Ĝi enhavas la tezojn de la Centra Komitato de Komunista Partio de Soveta Unio. Ni konsideras ke tio estas la ĝusta vojo por uzi Esperanton por praktikaj celoj. Sendepende ĉu iu konsentas aŭ ne kun tiuj tezoj, ĉiu povas ilin legi kaj mem prijuĝi. Ankaŭ aliaj landoj uzas Esperanton por politika informado, kaj tio estas bona, ĉar ĉiu esperantisto povas legi ĉies opinion.

ILUSTRITA DUMONATA BULTENO

La Torĉo

Aug. - Sep., 1970

連盟機関紙として

河野正彰

まず印刷人、編集人の個人的事情で発行が大巾にかつたことをお詫びします。昨年(1969)の北陸大会で、福井県エスペラント会を代表して、竹下氏より「ラ・トルチョ」の北陸連盟への提供が申し出され、拍手をもって受け入れられました。以後「ラ・トルチョ」は北陸連盟の機関誌となったわけです。はりきって編集に入っ

LA TORĈO, Jaro XII, N-ro 1. Mi la unuan fojon vidas tiun bultenon kaj el la tekstoj mi konjektas ke ĝi aperas en Japanujo. El 20 paĝoj 11 estas en Esperanto kaj 9 tiel kiel vi vidas sur la ilustraĵoj. La Esperantaj tekstoj traktas kooperativajn temojn. Sed al kiu servas la ideografiaj tekstoj? Por tiuj kiuj komprenas Esperanton, ne estas necesaj nacilingvaj artikoloj, ĉar ili komprenus ilin ankaŭ en Esperanto, sed alilingvanoj tute ne povas profiti la duonon de la materialo, do ili certe ne abonos aŭ aĉetos ĝin, pagante la tutan prezon por kompreni la duonon. Al tiuj kiuj ne scias Esperanton, ankaŭ ne taŭgas la bulteno, ĉar ili ankaŭ devas pagi la tutan kotizon por profiti malpli ol la duonon.

Tio validas pri multaj aliaj dulingvaj bultenoj kaj revuoj. Mi proponas ke la Esperantaj revuoj aperu en Esperanto por ke ankaŭ alilingvanoj povu ilin kompreni kaj aboni — la eldonejo certe profitos per plialtigo de la eldonkvanto. Per tiu mono ili presigu aŭ multobligu informilojn por neesperantistoj nacilingve. Tiam ankaŭ ili pli volonte aĉetos tion kion ili komplete komprenas.

Eĉ interŝange ni ne povas sendi nian revuon, ĉar la adreso estas verŝajne en japana lingvo kaj ni ne scias kie ĝi troviĝas.

Gratulon

松田久子

北陸エスペラント連盟がとうとう空き姿を現わし わけでもないですが、それぞれが、それぞれの戦後24年の11月9日、北陸エスペラント大会は 地方で一匹狼となりながらも個性的に生きて、とにいつになく組織問題に白熱しました。時間がなく、 もかにも北陸大会に馳せ参じて暖めてきた友誼に

Soveta Estonio. Ofsete presita kun multaj koloraj bildoj kaj kartona kolora kovrilo, formato 13 x 18 cm, 40 paĝoj + kovrilo. Informilo pri geografio, historio, ekonomio, klerigo, literaturo, arto kaj samprizorgado. Eldonejo »Eesti Raamat« en Tallinn, prezo 28 kop.

Horizonto de Soveta Litovio. En bela presita kovrilo ornamita per popolmotivo aperis la unua kajero eldonita de Esperanto-Sekcio de Litova Societo de Amikeco kaj kulturaj Rilatoj kun Eksterlandanoj kaj Vilnusa Esperanto-Klubo. Formato de Esperanto-Gazeto, 32 paĝoj + kovrilo. Ĝia tuta enhavo koncernas Esperanton kaj esperantistojn aŭ havas rilaton kun ili. Diference de aliaj respublikaj Esperantaj publikaĵoj el Sovetio, ĝi ne estas propaganda broŝuro pri la respubliko kaj ĝiaj atingoj en politiko, ekonomio, kulturo, klerigo, ktp, nek propagandas ĝiajn naturbelezaĵojn. Ornamas ĝin kelkaj literaturaj kontribuoj eĉ kanto kun notoj.

Oni povas ĝin ricevi interŝange post interkonsento kun Societo de Amikeco, Esperanto-Sekcio, Vilnius, Kostiuŝkos 36.

Ambaŭ laste menciitaj eldonaĵoj estas riceveblaj en Jugoslavio ĉe IOE tre malmultekoste. Postulu libroliston.

Sekanto

KIEL LA SKOLTA MOVADO RILATAS AL ESPERANTO

(Laŭ kalendaro prezentita de s-ro Hammer, Nederlando, sekr. de SEL)

1934: La tiama Internacia Skolta Oficejo rezolucis: »...ne rekomendi la studadon de Esperanto, ĉar ĝi ne havas praktikan valoron...«


1957: Dan Spry, la nova Direktoro de Monda Sk. Of. petas al nia prezidanto L. J. van Gulck artikolon pri E. por la gazeto »World Scouting«

La posta (aganta) direktoro Dick Lund aperigis denove artikolon kaj du leterojn pri Esp. en »W. S.«

Philip Tossijn, Internacia Komisararo de Belgujo, deklaras:

Mi estas granda subtenanto de ĉiuj viaj strebadoj por Esp. en nia tutmonda movado, kaj se mi povas helpi vin, ne hezitu alvoki min.

1964: Iom subite kaj neatendite, precize 30 jarojn post la decido de 1934, la Komitato, dum kunveno en Luksemburgo decidis: »Esperanto... pruvis sian praktikecon en multaj medioj kaj en pluraj skoltasocioj ĝi estas permesata ĉe la Interpretista insigno. La Komitato nuligas sian decidon de 1934, sed ne faras iun alian agon.«



Dro Laszlo Nagy, la nuna Direktoro, skribis al ni: »Mi estas certa, ke ni havos intiman kaj amikan kunlaboron...« kaj en posta letero:

»Mi estas certa ke E. havos bonan estontecon en nia Movado.«

1968: En Essex, Britujo okazis la 6-a Internacia Jamboreo, en kiu 500 britaj kaj 1500 eksterlandaj skoltoj partoprenis. La organizanto decidis ke ĝi estu dulingva: angla/esperanta. Tiu decido venis tre malfrue, tial nur 100 esp. ĉeestis. Ilia ĉeesto tamen estis bone rimarkebla. Je la fino de la kunveno.


Tom Parrinder deklaris: La uzeo de E. vekis multan intereson, kaj nun mi estas certa, ke ĝi grave kontribuas al internaciaj skoltaj kunvenoj, se oni decidus uzi ĝin...«

Nun petoj pri informoj venas. Esp-istoj decidas varbi skoltojn. Tio devigas al SEL eldoni novan ler-

(Fino sur p. 11)

NOVAJ DIREKCIANOJ de I. O. E.

(Prezentitaj kun iom da malfruo)



WIM DE SMET


Li naskiĝis en Antverpeno (Belgujo) en 1932. Doktoro en zoologiaj sciencoj. Ĉefasistanto en la Stata Universitata Centro de Antverpeno, parte ŝargita per kursoj de la medicinaj studentoj.

Lernis Esperanton en 1957. Estrano de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). Prezidanto de Ornitologia Rondo Esperantlingva. Li estas unu el la kvar personoj kiuj okupas sin pri la Someraj Universitataj kursoj en la Universitato de Lieĝo, kiuj okazos de 1972 kun Esperanto kiel instrulingvo.

En la Direkcio de IOE li gvidas la sekcion »SCIENCOJ«.

NIAJ AKTIVULOJ

BRANKA LEONTIC, profesoro de rusa lingvo en Sabac (Jugoslavio) kie ne estis esp-istoj. Antaŭ 5 jaroj komencis lerni Esperanton aŭtodi-dakte. Si konatigis kun IOE pasint-somere, sed jam vaste agas laŭ la konsiloj kiujn ŝi trovas en Esperanto-Gazeto kaj propagandas Esperanton speciale en la medioj kiuj havas



internaciajn rilatojn. Dum mallonga tempo ŝi vendis pli ol 70 lernolibrojn kaj 50 insignojn »Esperanto parolata«; en sia lernejo gvidas kurson. Esperantigis interalie du personojn laborantajn en turistoficejo. Post duagrada ekzameno, kiun ŝi sukcese faris, ŝi ekgvidos kurson por plenkreskuloj.

Gramofondiskoj kun la kantoj de konata bulgara kantisto **MISO ZDRAVEV** estas mendeblaj ĉe IOE por \$ 1.— popeco:

- 1) Bonan nokton; Steletoj; Mia kubo; Luĉvika Aleksandra.
- 2) Servu ni; Revenu vi; Ropotamo; Mia eta Ĝim.

Krome ankoraŭ estas haveblaj:

| | | |
|---------------------------------------|-----------|--------|
| MONDMAPO | — — — — — | \$ 1.— |
| Emajlita insigno ESPERANTO PAROLATA | | 0,50 |
| Gluisigno | ” | 0,20 |
| Tolinsigno | ” | 0,20 |
| Manĝokartoj (10 ekzempleroj) | | 0,20 |
| Glumarkoj AEROPOSTE (10 folioj po 10) | | 0,50 |

Pagi al ĉekkonto notita sur paĝo 2.

KIEL LA SKOLTA MOVADO ... (fino)

nolibroj, kaj el tio kreskas la propaganda kampanjo, kiu komenciĝis per oficiala transdono de la libro dum la kunveno de la Konferenco en Helsinko, aŭg. 1969.

Dr. Nagy »Ni estas feliĉaj ke vi volas ion entrepreni por tia utila lingvo« En aliaj leteroj li komprenigas al ni pri la nun ekzistantaj lingvaj problemoj en la Sk. Movado.

Kol. B. W. Kontiopää, organizanto de la Konferenco en Helsinko: »...mi estas konvinkita ke via libro estos bonega kontribuo al la tutmonda aktiveco de Skoltado... SEL estos bonvena en la kunsido...«

Dume montriĝis ke ĝenerale la opinioj pri E., speciale en pli altaj skoltaj medioj estas same bonvolaj kiel la supre menciitaj. La tempo do estas matura por pliaj agadoj. Jam venis tre pozitivaj respondoj de sk. asocioj en I, N, S, D, MEX, ... kaj ĉiutage ni atendas aliajn. (nov 1969)

FAVORAJ KONDIKOJ. 1971: Monda Jamboreo en lando kun »malfacila« kaj nekonata lingvo. Tamen sub titolo »Por Interkompreno! Notinde estas ke en »World Sc.« kelkaj skoltoj dubas pri la valoro de tiaj grandegaj kunvenoj, kie la sk. tamen apenaŭ interkonatigas.



Panas Vasilĉenko, nia fervora peranto, kiu antaŭ 2 jaroj estis rekordulo en la kolektado de abonantoj kaj samjare en nia Granda Konkurso gajnis la premion »Senpaga partopreno en la 3-a Laborkonferenco de IOE en Primošteno« — nun festas du jubileojn: 50 jarojn de sia esperantistigo kaj »Oran geedziĝon«.

Li lernis Esperanton en Bijsko — Siberio, kie li organizis la unuan E-societon kies unua sekretario estis A. Hoĥlova, lia nuna edzino. Post tio li organizis kelkajn aliajn societojn, kursojn, ekspoziciojn, faris prelegojn. En la lastaj jaroj li senlace laboras por Esperanto en Kiev kiel gvidanto de E-sekcio ĉe la Domo de Sciencistoj.

Krom Esperanto-Gazeto li estas peranto de Nuntempa Bulgario, Heroldo de Esperanto, Homo kaj Kosmo, Scienca Revuo, La Suda Stelo Pola Esperantisto k. a.

Al ambaŭ festantoj mi plenkore gratulas kaj deziras ankoraŭ 50 jarojn da aktiva laboro en plena sano.

DONACIOJ AL LA FONDUSO »OFICEJO«

El. Fed. Resp. Germanujo:

| | |
|-------------------|----------|
| Richard Wluka | \$ 1,35 |
| Arthur Bolle | \$ 0,14 |
| Kurt Schönrich | \$ 13,65 |
| Albert Stephan | \$ 5,60 |
| Max Murath | \$ 3,14 |
| Otto Peine | \$ 0,41 |
| A. N. | \$ 11,33 |
| Friedrich Schurad | \$ 1,50 |
| Hermann Zwikirch | \$ 3,— |
| Schöner | \$ 0,41 |
| E. Thimm | \$ 6,28 |
| Joh. Schmid | \$ 0,54 |
| Bräuer | \$ 0,27 |
| Anna Hirsch | \$ 2,73 |

El Svisujo:

| | |
|-----------------------|-----------|
| Fr. Bierhoff | \$ 0,23 |
| Henriette Ith | \$ 2,51 |
| Karl-Heinz Mischler | \$ 0,23 |
| H. Schmutz | \$ 2,51 |
| Werner Schaufelberger | \$ 1,37 |
| D. Hermann | \$ 1,14 |
| G. Weigelt | \$ 2,06 |
| Antaŭe kvitancita | \$ 934,21 |

Entute \$ 995,61

DONACIOJ AL LA GENERALA KASO

| | |
|--|----------|
| H. Scheffler, F. R. Germanujo | \$ 81,96 |
| F. Liebl, F. R. Germanujo | \$ 2,73 |
| F. Vogel, F. R. Germanujo | \$ 1,37 |
| Melburna Esperanto-Societo, Aŭstralio | \$ 19,04 |
| Miloslawa Kolinska, Pollando | \$ 15,74 |
| August Heinrich Inselmann, F. R. Germanujo | \$ 0,41 |
| Moritz De Sassi, Svisujo | \$ 0,23 |
| H. Witkowski, Pollando | \$ 0,50 |
| Stanislaw Biesiada, Pollando | \$ 3,— |
| Sheila J. Gemmel, Novzelando | \$ 3,— |

Al ĉiuj donacintoj ni elkore dankas, al la novaj subtenantoj kaj speciale al la nova patrono ni gratulas.

NOVAJ SUBTENANTOJ POR 1971

Kurt Schönrich, F. R. Germanujo
 Altert Stephan, F. R. Germanujo
 E. Thimm, F. R. Germanujo
 Miloslawa Kolinska, Pollando
 A. N., F. R. Germanujo
 Melburna Esperanto-Societo, Aŭstralio

NOVA PATRONO

S-ro H. Scheffler el Oberhausen, F. R. Germanujo atingis per siaj donacoj la sumon de 200 usonaj dolaroj, per kio oni fariĝas patrono de IOE.

P E R A N T O J

Argentino: Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, ROSARIO

Aŭstralio: Kenneth G. Linton, 11 Poplar St., SOUTH CALFIELD, Vic. 3162. Abono: \$ 2,-

Aŭstrujo: Aŭstria Esperanto Movado, Hofburg, Bathyanystiege, A-1014 WIEN.

Belgujo: „HEROLDO DE ESPERANTO”, 13 rue de la Reinette, Bruselo 1., Abono 100 b. fr.

Brazilo: Alfredo Énio Duarte, Caixa Postal 18 (Esperanto) ZC-00, RIO DE JANEIRO, E.G.B., kaj BRAZILA ESPERANTO-LIGO, Praca de República 54, RIO DE JANEIRO.

Britujo: Brita Esperanto Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W 11.

Bulgarujo: Petr Ivanov Mutafčiev, ul. Persenk, bloko 20-A, SOFIA-7, tel. 62 18 24; kaj Jordan D. Kalinov, Bul. „G. Dimitrov”, bl. „Debeljanov” A-20, RUSE. — Tel. 25877. Abonprezo 5 levoj.

Ĉeĥoslovakio: Jos. V. Otta, Vančurova 34, ŠUMPERK Jarabono 44 Ks. kaj DOVOZ TISKU, Praha 2 Vinohrady, Vinohradská 46.

Danujo: Ing. Uwe Lohse, str. Bakkesvinget 5, 3400. TULSTRUP/Hilrd. Poŝtgirkonto 14 41 16. Abono DK 14.—

Finnujo: Joel Vilkki, SOMERO-9.

Francujo: Germaine Kirtz, 5 bd des Alliés, F-68 MULHOUSE; Pk STRASBOURG No 993.48. — Abono: F 12,50.

Germana Feder. Resp.: Manfred Führer, Postfach 162 D-3340 WOLFENBÜTTEL; poŝtĉekkonto: Karlsruhe 1154 71.

Grekujo: Kimon G. Eliopoulos, 130 El. Venizelos str. NOVA SMIRNA — ATHINAI. Tel. 931-214.

Hindujo: Hinda Instituto de Esperanto, P.B. 604, NEW DELHI-1.

Hispanujo. Juan-Luis Vallés, Apartado 7018, BARCELONA. Abono 140 pesetoj.

Hungarujo: Hungara Esperanto-Asocio, Kenyérmező u. 6, BUDAPEST VIII.

Israelo: Ben-Alder Jehiel, P.O.B. 379 PETAH TIKVA Ab. 6 liroj. Poŝtĉekk. Bank Hadoaz 445854-8.

Irlando: Pat O'Reilly, „Woodbine”, Bluebell, Dublin 12.

Italujo: Dott. Giovanni Marchiori, Via Cantore 15 (Gal-

leria Astra), 37100 VERONA. Abono 1.200 Liroj, poŝtgirkonto n-ro 28/22942.

Japanujo: Internacia Fako, OOMOTO, Kameoka, Kio-to-hu

Jugoslavio: IOE, 11000 BEOGRAD, Lole Ribara 14 ĉk 608-8-1353-10. Abono 20 din.

Kanado: W.D.B. Hackett 326 Soudan Ave, TORONTO 7. Ont.

Kubo: Raúl Juárez Sedeno, Apartado 570, CAMAGÜEY.

Madagaskaro: Eugène Ravéloson, Boite Postale 1678, TANANARIVO.

Meksiko: F-ino Margarita Nájera S., Lauro Aguirre 243-3, MEXICO 17 D.F.

Nederlando: Ing. D. Klage, Talingstr. 8., SCHOORL (NH). — Abono 7,50 hfl al Boerenleenbank Schoorl (NH), Kto 5082 R.

Norvegujo: Eldonejo Esperanto A/S (Esperantoforlaget A/S), Box 942, OSLO 1., Poŝtgirkonto 100.31.

Pollando: S-ino Miloslawa Kolinska, Sopocka 2/2, SZCZECIN

Portugalujo: D-ro A. César Anjo, Av. 28 de mayo 12, VISEU.

Rumanujo: Maria Vitályos, C, postala 14, TIRGU SECUIESC, jud. Covasna.

Sovetio: Ivan Palkin, ul. Televidenija d. 7, kor. 3, kv. 44, MOSKVA M-449.

Valev Kruusalu, Pärja 42, TALLINN-9.

Romano Grinšpan, ul. Sajfulina 4, TASKENT 125, Uzbeka SSR.

Panas Vasilčenko, Poŝtkesto 375. KIEV 24. Abonprezo 4 rub.

Svedujo: Gerhard Nyqvist, Johan Skyttes väg. 5 JÖNKÖPING.

Svisujo: Manfred Führer, Postfach 162 D-3340 Wolfenbüttel, Germ. Feder. Resp. Pk. Zürich 80-67294.

kaj Claude Gacond, Miéville 133, CH-2314 LA SAGNE. Abono 9 Sv. Fr.

Usono: Conrad Fisher, R.F.D. No. 1., MEADVILLE, Pa. 16335.

Venezuelo: Prof. J. E. Bachrich, Aptdo. 146, VALENCIA, Edo. Carabobo.

El ĉiuj aliaj landoj perantoj serĉataj. Perantoj ricevas 20%-an rabaton por kovri la kostojn.

ABONPREZO: 2 dolaroj aŭ egalvaloro